



LA 12 SIMBOLAJ BESTOJ

Mao Zifu

la 12 simbolaj bestoj estas precipe en ĉinio asociitaj kun la 12-jara ciklo, kaj ĉiu el ili respektive uzata por indiki la jaron de la naskiĝo de persono (la 12 bestoj estas laŭvice: muso, bovo, tigro, leporo, drako, serpento, ĉevalo, ŝafo, simio, koko, hundo kaj porko)

Muso

fortika la nacio pli ol tiu de la dinosaŭroj,
spitante kataklismon, katastrofon kaj venenojn,
traĝuas fluojn kaj solidojn.

sub ŝirmo de la nigro

decas prifoso kaj mordado.

oestro sen sezono, geedziĝo sen leĝaro.

dumviva rango egaligas morton al nenio.

kapablo pentri o-on por la krono jam sufiĉas.

ĉielo en la pugno.

la buŝoj en la pajlaj kapoj

huraas saton kun la ventro plena nur de gaso.

kuŝante sur skeletoj laŭraj

la manoj ludas kaj jonion kaj lingamon.

budaaj idoj do fekundas ekster la kondomo.

elmuldigitaj cerboj flosas sur la sango.

krono kaj trono. la stafeto daŭras ĝis eterne.

la templo estas paradizo de bestaro egidata.

Bovo

maŝino de farado el pajloj al nutro.

nutraĵo ne por memaj idoj.

kulio flegas kampojn.

merito estas vipo.

kastritaj la organoj produktas riĉigon;

gefiloj venas nur el masturbado.

la kornoj sur la kulmo.

la vosto restas ŝrumpa.

vesto kolora estas alies afero;

la haŭto iĝos poluritaj ŝuoj.

kun piedaroj sur la dorso iri

gemastran vojon.

la nupto petardadas for de la okuloj.

kaj vino kun la karno.

morto al tranĉo dankas.

dankas al tranĉo la osto fariĝas

kiĉo. ho,se ne estu straso de eburo!

Tigro

buĉado,rajto orakola.
iama la ĝangalo estas okupita de kataro.
vegetarano manĝas artefaritaĵon
en kaĝo ŝtala sur betono.
la gloro aldonita al la vulpo
fadas sur pergameno la antikva.
la strioj neŝanĝeblaj brilas sub neono,
kaj ĉirkaŭita de fragilaj fingroj.
kuniĝo sen amoro.
nutrigo de idaro per tepida cicumilo.
nenia eĥo pro montara manko;
roroj glutatas en koŝmaro.
pasia prezentado imitanta klaŭnon
sub jupo,reto ŝprucotenta,
nur rikoltigas predojn al la majstro.

Leporo

starantaj la oreloj priatentas ondojn
el la ĉielo. sinpaŝti sub anteno de cervego.
fore de ungoj de leopardo

tamen ĉe faŭko de pafilo.
la kontemplado dekmiljara ne kapablas
bari ekbombon. kien fuĝi?
altengrimemaj la kruroj trovas nur nebulon.
ekster gravito flugas metalpecoj.
se nur mi estu tigro,
kiu senkulpan rajton havas
kaj povas maĉi ostojn de homaro!

Drako

kajto aŭ ŝipo dancas
sur la ĉiela volbo aŭ marfaco.
fluido as vehiklo de vivado.
jam grandiozo solidiĝis rokon.
papero aŭ segligno anstataŭis la ostaron;
spite la kapo universas pufe.
balona ekspansio venas el vaporo.
bastonoj sur la dorso de ŝafaro
kreskigas laŭrojn kaj panegirantojn.
radiojn manĝas la nigra truego.
kurbiĝaj la spiritoj ne kapablas fuĝi
elde la umbiliko megalita.

fuzio kaj eksplodo.

forto la centrifuga kreas novaajn limine.

Serpento

sprita la lango sensas pri sezonoj.

ĵaluza la kvieta sango iras krabe.

en katakombo kuni kun reĝino.

kaj mutacie doni la damaskon al ĉi reĝo.

bebo mortigas la geedzojn.

la ŝelo ekfariĝas muzikilo.

la karno frikasita tentas la okulojn de geviroj

ĉe nupto aŭ funebra festo.

Ĉevalo

poltrono, mi starante dormas sur granito.

kun la okulo dekstra malfermita

rigardi la mamparon de edzino

timante palpon de inkubo.

cemento, glacipeco.

montaro, stovo lafa.

kurpreta la kruraro fulme perdas senson,

do mi dormante staras sur sableroj

kun la okulo liva malfermata

kaj gapas la edzinon mampinti eŭnukon.

Ŝafo

kaŭre la mamon suĉi.

danke al la patrino mi ekhavas vivon.

ĉiuj paŝetoj en rigardo via

kaj ekparoli atendante kapojeson cian.

sed ribelema mano premas la kolbason

en pantalono aspirante venon de sukubo.

la lipoj gustas laktan sakon de bovino.

galopo inter montoj pufaj kaj lageto flusa

ekster la vidokampo kaj ŝtalfera ĉelo.

kastrita la banano semon jam ne havas.

anĝeloj adiaŭas por ricevi spasmon.

kanonu do al firmamento

kaj gajakcepti knedon de frigida sorĉistino.

Simio

sen pugo mi ekvagabondas
levitacie en la marto oestropleniga.
rifuzi la gravitan planon kun erikoj,
serĉi magnetan la tridimension rozan.

aerolito min altrafas.
dido sableje kuŝas neflugebla.
miraĝo nubas sur nebulo.
la pugo ne subtenas seĝon.

la plana lakte lubrikadas mian buŝon plumban,
la brusto mola ŝanceliĝas lule;
kaj la tridimensia ĉe mi ludas orjonion,
la sirengemoj pulsas pro geĵina sceno.

platono vivis ise for,
la amo ja bezonas tuŝan sensoron.
kaŭĉuka penisingo estas ŝtelimuna;
fridigi la sukmaron por eventuala ekcunamo.

Koko

modesta krono trinkas sub oleolampo.

kaj la miop-okuloj blindas en kurteno

kun nepovado bari nokton.

la klamoj tudas multe da nigroĝuantoj.

stilzistoj prance dancas senvestiĝaj,

en muroj kiuj kontraŭas la sunon.

subaĉetitaj atestiloj kovras la vizaĝojn

kaj ĉiopova la manaro faras la terglobon.

ho, tiuj ĉi kokinoj kovas nur anasojn,

for de la fonto kiun la viro elpremis.

Hundo

simion jam perfidas la homaro.

homon neniam hundo,

riĉan aŭ povran.

ombro la korpon sekvas sen faziĝoj.

sed la du-kruraj ĉiam kontraŭ memoj.

la dekstra mano al la liva,

kaj la dentaro al la lango.

patro la filojn buĉas por la trono.

mastro vorigas harobalojn

al la fidela por akiri gemon medicinan.

ŝtono en la intesto pagu la dorlonton.

mamono la simion rehundigas.

Porko

pigra la mio kuŝa unuflanke:

la para

liziĝa.

2004-11- 27 – 29

La Kancerkliniko/n-ro 113/jan-feb-mart 2005